

LA VERDA LUPEO

25a jaro



12(91) INFORMILO DE ELF-AREK decembro 1992 *

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh eV

28-a Univ. Kongreso de Esperanto, 1936
Oficiala Kongreskarto.

Nova Imperiestra Kastelo kun Int. Esp. Muzeo
[Vidu la flagon]









Nur mit Flugpost



Herrn W. Ruckgaber
Landesarbeitsamt
Klagenfurt

36702



Universalaj Kongresoj en Vieno (A) 1924 - 1936 - 1992

KONGRESEJO



2

1450 WIEN - Austria Center
26.7.1992 77-a Universala
Kongreso de Esperanto
25.7. ĝis 1.8.1992 en Vieno

Josef Manninger
Absender
Expéditeur
A-8020 Graz

Österreich ist schön. Komm, bleib.

Postkarte
Carte postale



1

1450 WIEN - Austria Center
26.7.1992 77-a Universala
Kongreso de Esperanto
25.7. ĝis 1.8.1992 en Vieno

Rudolf Burmeister
Max-Müller-Str. 62

D-O-9051 Chemnitz

NI PRI NI

Pagi kotizon!

Eblas pagi la kotizon pere de la UEA-konto: elfx-r. Tiel vi evitas altajn transpagajn bankkostojn.

ELF-AREK`anoj "paŭzas".

Pro la ekonomia evoluo pluraj el niaj estimataj ELF-AREK´anoj devas paŭzi. Ne plu eblas al ili pagi la ege kreskintajn poŝtajn tarifojn. Tial bonvolu kompreni, se iu el viaj E-filatelaj geamikoj subite ne plu korespondas kun vi. Mi opinias, ke nia mondo staros antaŭ ekonomia kolapso kaj, ke la venontaj jaroj fariĝos malfacilaj ankaŭ por ni. Ni nepre klopodas daŭrigi nian agadon kaj havas bonajn ŝancojn transvivi.

La redaktoro

SERĈATA



Anonco

J. Mikulski, skr. poczt. 30, PL 10-001 Olsztyn 1 serĉas antaŭmilitajn, purajn E-tutaĵojn de Aŭstrujo, Brazilo, Nederlando kaj Sovet-Unio. Li redonos, interŝanĝe, poŝte uzitaj, ankaŭ el aliaj landoj.

NIAJ MORTINTOJ

Ni funebras pri...

CONRAD FISHER (1912 - 1992)

Li estis UEA-delegito ekde 1933, ĝenerala sekretario de la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo, sekretario de E-Ligo de Norda Ameriko ĝis 1971 kaj ekde komenco membro de nia ELF-AREK. Li ĉiam tre subtenis nian klubon.Li mortis la 23an de junio 1992.

LOUIS JOHANNES WULFERS (1909 - 1992)

Li estis dumviva membro de UEA kaj UEA-delegito de Nijmegen (NL) kaj tre aktiva Esperantisto. Al nia klubo li apartenis ekde de la komenco. Li forpasis la 17an de junio 1992.

Sinceran kondolencon al la familianoj!

NI EN EKSPOZICIOJ

Österman kaj Vana en la Monda Tematika Ekspo GENOVA`92

En tiu plej altranga Monda Ekspozicio de Tema Filatelio, Genova´92, partoprenis per siaj E-filatelaj ekspozaĵoj, niaj klubaj geamikoj: Terttu Österman el Finnlando kaj Vladimir Vana el Ĉeñoslovakio. Ni tutkore gratulas al:

s-ino Österman pro akiro de vermejla medalo, kaj al
s-ro Vana pro akiro de granda vermejla medalo!

De tiu ekspozicio nia Terttu Österman sendis belan ekpozician bildkarton kun ekpozicia glumarko kaj ekspo-stampo el la "Tago de Palmares", per kiu ŝi sciigis pri la tre bonaj rezultoj.

Koran dankon kaj saluton al vi!



La supra parto de la poŝtkarto el Genova de s-ino Österman.

Mikulski en pola regiona ekspo

Post pli longa ekspo-paŭzo nia Mikulski denove partoprenis en ekspo. Nome en la Regiona Eskpozicio de Olsztyn en junio 1992. Montrataj estis la plej bonaj ekspozaĵoj de membroj de Pola Asocio de Filatelistoj en regionoj de Varmio kaj Mazurio. Li akiris Grandan Oran Medalon, la Unuan Premion kaj juĝistajn gratulojn. Estis jam la 33-a fila-ekspo, en kiu li montris sian E-filatelan ekspozaĵon. Ni direktas al vi korajn gratulojn kaj mi kore salutas vin kaj dankas al vi pro via interesa letero!

Piton skribis al la redaktoro



"...mi deziras, ke mi kiel "kometo" (LVL 88) ne fariĝu "falanta stelo". En BRAPEX mia kolekto ne debutis, sed en la regiona ekspo 1990 sen la minimuma nombro da folioj kun bronzmedala rezulto. Dank' al miaj lokaj filatelaj konsilantoj (altnivelaj filatelaj spertuloj), mia kolekto rapide trapasis multajn el la komencantaj mispaŝo, ĉu en la "fizika" muntado, ĉu en la uzado de filatelaj pecoj. Cetere: akiri medalojn per mia kolekto, alportas al mi nenian personan fieron, sed sinceran ĝojon propagandi kaj reprezenti Esperanton en la medio de oficialaj ekspozicioj. Al LVL mi ŝuldas multe el miaj E-filatelaj scioj kaj mi ĝojas legi en "Ni en ekspozicioj" pri alies atingoj. Mi dezirus, ke aliaj s-anoj stimiliĝu ekspozicii."

Nia Piton pasintjare akiris jenajn medalojn:

EXFILBO 92	Arĝenta Medalo
ARBRAFEX 92	Granda Arĝenta Medalo (argentina-brazila ekspo)
LUBRAPEX 92	Vermejla Medalo (portugala-brazila ekspo) + ĵuriajn gratulojn+ premion "junularo" por la plej bona ekspozaĵo en tiu rango.

En 1993 li fariĝos "filatela plenaĝulo", sed antaŭe li ankoraŭ estas invitata partopreni, pere de sia ekspozaĵo "Babelo estu detruita", junularan filatelan brazil/germanan ekspozicion en Mainz (Germanio).

Piednoto de la redaktoro:: Dankon al vi pro via interesa kaj longa letero kun reproduktaĵoj kaj pm-bloko. Akceptu niajn sincerajn gratulon pro viaj sukcesaj agadoj en ekstermovada medio! Kun intereso ni ricevis vian raporton pri via E-filatela aktivado dum la 28a brazila E-kongreso.



La bloko de la portugala-brazila filatela ekspo LUBRA-PEX 92.








"La pm-bloko por la ABRAFEX 92 pri la "gauĉoj". Ĝi okazis en la ĉefurbo Porto Alegre de nia plej suda ŝtato -Rio Grande de Sul-. La tieaj moroj kaj tradicioj similas al tiuj de Argentino."

(Tion skribis Piton)

Filatela ekspozicio en Straẑnice 1992

La filatela klubo de Hodonin kaj la E-klubo de Straẑnice kun subteno de la Asocio de ĉeĥaj filatelistoj, Esperanto sekcio, okazigis la filatelan ekspozicion "STRAZNICE´92". La devizo estis: KOMENIUS KAJ INTERLINGVISTIKO EN FILATELO". La Organizan Ekspozician Komitaton prezidis nia Vladislav Hasala. Entute partoprenis 18 ekpozaĵoj kaj inter ili jenaj E-filatelaj ekspozaĵoj:

-Esperanto-internacia lingvo kaj ĝia reago en la filatelo de Alois Jakubec kun rezulto: Granda Arĝentumita Medalo

-Esperanto- en filatelo de Vladislav Hasala kun la rezulto: Malgranda Orumita Medalo + premio

-Esperanto-en korespondado de Fridrich Zöld, Budapest

-Esperanto-internacia lingvo de Odon Horak kun rezulto: "honora premio"

-Esperanto- en pola filatelo de Vladislav Hasala

La aliaj ekspozaĵoj estis dediĉitaj al aliaj diversaj temoj . Entute estis donitaj medaloj kaj honor-premioj al 11 ekspozaĵoj.

La 46-paĝa ekspo-katalogo estis verkita en la ĉeĥa kaj Esperanto. Ĝi enhavis mesaĝojn de la urbestro kaj de la prezidanto de E-sekcio ĉe la Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj, Vladislav Hasala. Apud informoj pri la ekspo ankaŭ estis notitaj ĉiuj E-filatelaj materialoj en ĈS.



La ekspo-programo antaŭvidis i.a. tritagan viziton de japanaj E-istoj kaj viziton de kongresanoj el la 77-a UK en Vieno. Ili venis el 30 landoj.

Al la ĵurio apartenis ankaŭ nia Vladimir Vana, oficiale sendita de ACF.

Do: ELF-AREK gratulas al ĉiuj E-istaj ekspozantoj pro la aktiva partopreno en tiu ekspozicio. Koran dankon ankaŭ al V. Hasala, kiu sendis al mi la ekspo-katalogon. Sur ĝia bazo mi verkis tiun ĉi informon. Informojn pri akompanaj, ekspoziciaj E-filatelaĵoj trovu aliloke sub la koncernaj rubrikoj.

NI EN ALIAJ GAZETOJ

"FRANCA ESPERANTISTO" Pri Odo Bujwid kaj Charlie Chaplin.

En ĝi ofte aperas artikoloj, ligitaj al la E-filatelo, de nia kluba amiko Amouroux. La decembra numero 1991 enhavis jam la sesan daŭrigon pri: "Esperanto, filatelo...kaj medicinistoj". Temis pri la vivo de Odo Bujwid, fama pola kuracisto kaj Esperantisto. La februara numero de 1992 enhavis el la plumo de Amouroux interesan artikolon pri la filmo de Charlie Chaplin "LA DIKTATORO". Tiu filmo havis sian premieron la 15an de oktobro 1940 en Novjorko. Sur la muroj kaj butikoj de la juda geto estas videblaj pluraj surskriboj en Esperanto, kiel: lipharoj, kafejo, vestaĵoj malnovaj, cigaroj, restoracio kaj aliaj. Charlie Chaplin do altpense utiligis Esperanton



Pola pm kun Odo Bujwid

Memorigan pm pri Charlie Chaplin eldonis Italio 1989. Tiu ankaŭ montras scenon el la filmo.
(Rimarko de Hirsch: Bedaŭrinde, ke la surskriboj en filmo parte estas iom kripligitaj)



"LA PHILATELIE FRANCAISE"

Nia Amouroux kontinuas artikoladon ankaŭ en tiu plej populara gazeto de francaj filatelistoj. La marta numero 1992 sciigas pri E en telegrafio kun fotoj pri E-telegramoj kaj aliaj E-filatelaĵoj.

"PHILATELIE" Tiu informilo de Germana Filatelista Asocio raportas en sia septembra numero de 1992 pri la enhavo de nia LVL 88. Tiu Asocio havas 15 000 enlandajn kaj 4000 eksterlandajn membrojn. Ankaŭ niaj germanaj E-filatelistoj apartenas al ĝi kiel "Laborgrupo Esperanto". Tiu membreco iomete helpas al ELF-AREK vivteni sin per la forvendo de nia LVL. Tiamaniere nia LVL iras al ĉiuj germanaj filatelistaj bibliotekoj kaj ankaŭ iras al germana filatelista asocio en Novjorko kaj al aliaj eksterlandaj filatelistaj asocioj, ne-Esperantistaj.
La membrecon iniciatis nia Richard Hirsch. Li meritas pro tio dankon de ni.

Loka hobia bulteno en Bydgoszcz.

En la "Ilustrita Tema Bulteno" de la hobia klubo "Fervojoj" ĉe la filatela klubo de Bydgoszcz dum 1992 aperis artikola serio pri IFEF lige kun E-filatelaĵoj. La aŭtoro estas Mikulski, kiu ĉi-loke dankas al niaj Heimlich kaj Gimelli pro ilia helpo per materialo.

Tematica(Brazilo)

La filatela kaj kultura revuo "Tematica", trimonata organo de ABRAFITE-Brazila Pritema Filatela Asocio en siaj numeroj 123, 125 kaj 126 enhavis filatele ilustritajn artikolojn: "Esperanto: ĉu ideo, kiu ĝenas?"; "Esperanto en arbitraj reĝimoj" kaj E-o en la stalinisma reĝimo". Aŭtoro estis nia Piton.

NOVAJ STAMPOJ

Aŭstrio

UK-stampo el Vieno

De niaj Elda Dörfler kaj Ivar Paulsson atingis min pk kun tiu stampo. Anton Straif rakontis pri ĝi persone al mi. Josef Manninger sendis ĝin (ilin) kun la poŝta filatela informo de 16 06 1992. En ĝi estas notoj pri iom alia stampo en iom alia mezuro. Anstataŭ la nuna teksto la una versio tekstis: INAŬGURO DE LA 77-a...ktp., oni do ellasis tiun: INAŬGURO DE LA.... Funkciis de la 25 07 ĝis 01 08 en la kongresejo "Aŭstria Center Vienna" speciala poŝta giĉeto de la poŝtejo 1450 Wien-Aŭstria Center ĉiutage de la 9-a ĝis 16-a horo. Ekzistis du stampiloj kun la ciferoj 1 kaj 2. Manninger sendis belan poŝtkarton kun aldona afranko de 5-ŝilinga pm pri la kongresejo (vd. titolpaĝo).
Koran dankon al ĉiuj, kiuj informis.

Ĉinio

Pri la katalogado de ĉinaj stampoj.

Nia klubamiko, Richard Hirsch, eldonanto de nia granda katalogo, proponas novan katalogan sistemon por la ĉinaj stampoj: apartigi ilin laŭ Esperanto-temaj kaj ne-Esperanto-temaj stampoj(tamen kun E-enskribo).
En nia LVL ni restas ĉe la nuna sistemo. Tiel mi evitas eventualajn A-aŭ B-numerojn, se konatiĝis iuj ĝisdate nekonataj stampoj. Krome ĝi utilas por tuja uzado kaj por la posta katalogado. Ja eĉ niaj ĉinaj amikoj profitas el tio, ĉar tute ne ekzistas bone funkcianta E-filatela klubo tie. Ties tasko devus esti i.a.: registri novaĵojn. Sendube ekzistas iuj kaŭzoj por tio, sed mi jam deflankiĝas kaj tial nun la novaĵoj:

TJ 1992-08 (Zamenhof-Ninghai) NEPOSTA (vd.LVL 11(90)

Nia Gao Zhen Xing skribis: "...Mi nun informiĝis, ke la stampo "75-a datreveno forpaso de Zamenhof", estas n e p o ŝ t a. Bonvolu sciigi tion al s-ro Heimlich. Mi petas pardonon...". Do, karaj geamikoj, forstreku tiun pozicion el via ĉina stampolisto! Tamen...estus interese scii, kiu asertis ĝian poŝtecon kaj kiu ĝian nepoŝtecon! Ja, ne estis la unua nepoŝta stampo el Ninghai!
Dankon kaj saluton al Gao. Viajn aliajn informojn mi utiligos por la neksta LVL.

N O V A J   Ĉ Ì N A J   S T A M P O J

TJ 1991-64	Haikou	1991 10 10	LA REVOLUCIO DE 1911	
TJ 1992-08	Ninghai	....	nepoŝta	
-13	Ninghai	1992 01 25	LA SIMIA JARO (oficialeco, laŭ mi, tre duba)	(Trovita en ĈKĜ-listo sen priskribo)
-14	Haikou	1992 02 20	LA RARA ANIMALO CIKONIO (desegnis Z.Linrui)	(Trovita samloke)
-15	Haikou	1992 04 15	LA APUDBORDA BREDADO	
-16	Haikou	1992 07 25	LA 25-AJ OLIMPIKOJ BARCELONO	
-17	Haikou	1992 08 08	LA 3-A E-TAGO EN HAINAN	(Trovita en ĈKĜ-1)
-18	Cingdao	1992 08 17	5-A PACIFIKA E-KONGRESO	(fiŝoj)
-19	Cingdao	1992 08 18	SAMA	(stelo super ondoj)
-20	Cingdao	1992 08 19	SAMA	(ondoj)
-21	Cingdao	1992 08 20	SAMA	(ondoj, lumturo)
-22	Cingdao	1992 08 21	SAMA	(birdoj)
-23	Cingdao	1992 08 22	SAMA	(velboatoj)
-24	Cingdao	1992 08 18	MEMORE AL LA KOMPLETIĜO DE LA BUSTO DE DR L L ZAMENHOF	(Trovita en ĈKĜ-listo)
-25	Haikou	1992 08 18	LA INTERNACIA SPACA JARO	
-26	Haikou	1992 08 25	KLASSIKA LITERATURA VERKO TRI REGNOJ	
-27	Haikou	1992 09 15	DUNHANG FRESKO	(6-braka diino)
-28	Haikou	1992 09 15	SAMA	(dancistino)
-29	Haikou	1992 09 29	20 JAROJ DE LA NORMALIĜO DE LA RILATOJ INTER ĈINIO KAJ JAPANIO	
-30	Nanchang	1992 10 01	JIANGXI-A FILATELA EKSPOZICIO 1992	
-31	Nanchang	1992 10 04	SAMA	
-32	Haikou	1992 10 04	LA INSULETO "MAZHU"	
-33	Haikou	1992 10 12	LA 14-A TUTLANDA KONGRESO DE ĈKP	
-34	Haikou	1992 10 28	LA BONEGA KADRO DE ĈKP JIAO YULU	



TJ 1991-64



TJ 1992-13



TJ 1992-15



TJ 1992-16

L.R. Zhang

Originalo de segnajo de la stampo TJ 1992-14 de: Zhang Linrui





TJ 1992-19



TJ 1992-20



TJ 1992-17

TJ 1992-14



TJ 1992-21



TJ 1992-22

1992 8.17.17
266003-2

S-ro Rudolf Burmeister

Memoriga Koverto de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto

La 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto okazas en Qingdao, Ĉinio, inter la 17a kaj 22a de aŭgusto, 1992. La Kongresa temo: Kunlaboro kaj progresigo en la pacifika regiono.

Memore al la nomita kongreso, emisias la memorigan koverton la Poŝtmarka Kompanio de Qingdao, la 17an de aŭgusto, 1992.

第五届太平洋地区世界语大会纪念

TJ 1992-18



TJ 1992-23



TJ 1992-24



TJ 1992-25



TJ 1992-26



TJ 1992-27



TJ 1992-28



TJ 1992-29

1 0 0 0 4 4

中国邮政

贺年(有奖)明信片

Post of China

温馨 和谐 幸福







TJ 1992-30



TJ 1992-32







TJ 1992-31





TJ 1992-33 TJ 1992-34

NOVAĴOJ EL ĈINIO:

La novan liston mi trifoje devis renversi. Daŭre alvenis iuj informoj pri novaj aŭ malnovaj aŭ nepoŝtaj stampoj. Ankaŭ kontraŭdiraj informoj. Jen kelkaj ekzemploj: Nia KORALO informis pri du sta okaze de la Pacifika E-Kongreso kaj li sendis unu. Nia CKG sribis pri 6 diversaj sta por tiu kongreso. Nia CAO informis pri 1 sta okaze de Fila-Ekspo, sed sendis 2 diversajn. Multaj sta ne estas laŭ la Ĉina Poŝta Regularo pro manko de samsignifaj ĉinaj ideogramoj. Ni tamen ilin listigas, ĉar ili estis iel oficiale stampitaj.

Mi kore dankas al niaj CAO XONGLIN, SONG SHENGTAN, KORALO pro la senditaj informoj kaj materialoj. Laste ankaŭ dankon al ĈIN KAJĜI, kies hodiaŭ ricevita novaĵlisto plene ruinigis la antaŭan liston.

5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Cingdao

El 6 stampoj mi ricevis : TJ 1992-18, sendita de Song Shengtan el la poŝtejo 266003-2 sur memoriga koverto, eldonita de la Poŝtmarka Kompanio kun eldonkvanto de 5000 ekzempleroj. Sur ĝi estas notita la kongresa temo: KUNLABORO KAJ PROGESIGO EN LA PACIFIKA REGIONO.

TJ 1992-22, sendita de nia KORALO el la poŝtejo 266021-4 en viola koloro sur bela memoriga poŝtkarto kun klarigoj en la ĉina, angla kaj Esperanto. La ilustraĵo montras E-stelojn super ondoj. Subskribis tiu karton niaj ELF-AREK'anoj: So Gilsu, Shen Minglun, Gao Zhen Xing kaj

KORALO. Ĉu niaj klubaj amikoj ne sciis pri la aliaj kvar stampoj? Pri ili eĉ ne skribis Goa Zhen Xing, kvankam li loĝas en Qingdao. Kie tiuj kvar funkciis? Eble ne la kongresejo? Kiu skribos pri ili?

Filatela Ekspozicio en Nanchang 1992.

Ambaŭ stampojn, TJ 1992-30 kaj -31) sendis nia Cao Xionglin. Koran dankon al vi! Li sciigis, ke li partoprenis per E-filatela ekpozaĵo en tiu provinc-nivela ekspozicio. La Jiangxi-a Filatela Asocio, en kiu li estas membro, eldonas ĵurnalon "JIANGXI-a Filatelo". Jam pli ol 1-jaro ili uzas por la titola paĝo ankaŭ Esperanton. Krome ili sciigas pri la enhavo de nia LVL kaj foje pri iuj ĉinaj E-stampoj. Tiel mi trovis sur paĝo 5 de la eldono 1992-8-30 artikolon pri Chen-Ji stampoj. Montriĝis, ke en Nanchang funkciis 6 stampoj por tiu pm-serio. Inter ili ankaŭ nia E-stampo (Bonsai-pletforma).

江西集邮

JIANGXI——A FILATELO

省内部报刊准印证:(赣出内)字第89018号

江西省集邮协会编　总第98期　1992年8月30日

Hungario



H-124 -25-a INTERNACIA RENKONTIĜO NATURAMIKA (IREN).

Loko: ABALIGET Dato: 1992. 07. 16.

Sendis ĝin nia Stefan Fekete, kiu informis, ke nur unu tagon la poŝtejo uzis ĝin. Koran dankon al vi!

Japanio



J 24 -79-a Japana E-Kongreso en Matsushima-Miyagi.

Nia Haruja Maekaua sendis E-an bildkarton, eldonita okaze de la 79a Kongreso de Japanaj Esperantistoj (29-30 aŭg.1992). Nuligita ĝi estas per la memoriga E-a poŝtstampo. Apud la pm la normala nuliga datstampo de MATUSHIMA-MIYAGI: La E-sta montras "Bonsai-pletforman" insuleton en la lago Godaido(?), kiu estas ankaŭ montrita sur la bildflanko de tiu bildkarto. La teksto pri la kongreso estas notita per japanaj ideogramoj. Supozeble nia Haruja iniciatis kaj la stampon kaj la bildkarton, kiel ankaŭ la memorigan koverton. Pri ĝi li aludis en sia saluto. Jam estas la dua al mi konata "Bonsai-plet-forma" poŝta E-stampo. (La unua venis el Ĉinio) Belega stampo kaj belega bildkarto. Fakte insti-

gis min, akiri Bonsai-pleton! Koran dankon pro la informoj! Korajn salutojn.

AFRANKSTAMPOJ







AF: 400-jara naskiĝdatreveno Comenius.

Laŭ la ekspo-katalogo la kulturdomo Stražnican uzis de 20.7.-14.8.1992 tiun porokazan afrankmaŝin-stampilon kun la teksto: 400-jara naskiĝdatreveno de J.A.Comenius. Tamen oni ĝin uzis pli longe, tion pruvas koverto kun la dato: 20 08 92.







AF: Filatela ekspo Comenius.

Laŭ la ekspo-katalogo tiun AF uzadis la poŝtoficejo de Stražnice dum la ekspo-tempo, 25.7. - 2.8.1992. Tiu POSTALIA-stampilo posedas la tekston: Internacia filatela ekspozicio COMENIUS KAJ INTERLINGVISTIKO EN FILATELO.

(Ni dankas al nia Hasala pro la senditaj originaloj kaj materialoj)

En la ekspo-katalogo, paĝo 7, mi trovas ankaŭ informojn pri tio, ke la ĉeĥoslovaka poŝto aperigis ankaŭ por al ekspo:

-porokazan afrankmaŝin-stampilon POSTALIA en Hodonin 1 dum 5.-30.4. kaj 1.-30.6.92.

-samaspektan en Veseli nad Moravou 1 dum 4.-29.5.92 (ne notita en la E-teksto de la katalogo) kaj sur la paĝo 28 troveblas informo, 1/92, pri la aperigo de AF:
en Stražnice kun la dato: 30.3.1992.







Por ĉiuj tri AF estis uzata la sama tp-kliŝo en la ĉeĥa lingvo:(vd.supre)

Kontraŭdiraj estas la informoj pri la tempo de uzado. Bedaŭrinde la akompana bildparto ne dokumentas ĉiujn cititajn AF de la AF-listo. Sed ne tro gravas, ĉiuj tri, supre menciitaj AF, ne trovas lokon en nia katalogo. Ili ne estas E-sta. Tamen ni atentigas pri ili, ĉar ili havas eldiron unue pri Comenius, kiu apartenis al tiuj, kiuj subtenis ideon pri universala lingvo. Dua kialo: la mencio pri Interlingvistiko. Por E-filatela ekspozaĵo la materialoj estas utiligeblaj.

Necesas eble ankoraŭ ion ĝustigi: Okazis nek: "Internacia Filatela Ekspozicio", nek "Internacia E-Filatela Ekspozicio", sed TEMA FILATELA EKSPOZICIO" kun internacia partopreno (po unu ekspozaĵo el Budapest kaj Wien). Ĉi-loke nian gratulon al la organizantoj de la ekspozicio. Ili, sub malfavoraj cirkonstancoj, kapablis realigi tiun ekspozicion. Ĝojigas, ke la estraro de la kulturdomo Stražnice (verŝajne senpage) ebligis la okazigon de tiu ekspozicio kaj multe helpis en la preparo.

RECO-ETIKEDOJ

Ekspozicia reko-slipoj

Por la ekspozicio la ĉeĥoslovaka poŝto aperigis ankaŭ reko-slipon kun

la teksto: J. A. COMENIUS EN FILATELE. Eldonkvanto: 100 000 ekzempleroj.

Doporučeně
Recommandé

R J. A. COMENIUS en filatele 25. 7. - 2. 8. 92 Strážnice 01951

DO VLASTNÍCH RUKOU
DO VLASTNÝCH RÚK
A REMETTRE EN
MAIN PROPRE

EXPRÈS

ČESKOSLOVENSKO 10 Kčs
J.A. KOMENSKÝ UNESCO 1592 1992



Miroslav Zemánek
Lidická 42
Javorník u Jeseníku
790 70

R J. A. COMENIUS en filatele 25. 7. - 2. 8. 92 Strážnice 00000


R J. A. COMENIUS en filatele 25. 7. - 2. 8. 92 Strážnice 99999

La bildo en la ekspo-katalogo tamen montras la iom eraran tekston"... en filatele". La eldonkvanton mi divenis el la montritaj numeroj en la katalogo. La poŝtoficejo Straẑnice uzis ĝin ekde: 16. 7. 1992. Mi, la redaktoro, ne ricevis originalon. Domaĝe la preseraro. Se oni estis korektinta al: en filatelo, tiam estus E-rekoslipo. Se ne, ne.

CETERAĴOJ

Falsaj stampoj en niaj kolektoj!!

Falsa mi vidis la stampon HU 1 sur E-kov, kiu aperis en 1970. En mia kolekto la sta HU 1-8 aŭ estas sur tiuj samaj E-kov aŭ sur malnovaj pk kun freŝkoloraj pm. En FENIKSO (LVL), marto 1970, jam estis ĉi-rilata informo. Siatempe nia Amouroux skribis: "...Subite abundas E-sta el HU, kiuj ĝis nun mankis en multaj kolektoj (ekz. Szentes 1941, Oroshaza 1946 ktp.). Estas iom strange, ke sta el kelkaj 30 jaroj nun estas proponataj multekzemplere, kaj eĉ sur samaspektaj kov. Necesas averti niajn kolektantojn, ne aĉeti tiujn poste faritajn stampojn..." Nia karmemora Jensen komentis: "...se oni prezentas ili aŭtentikaj , tio estas trompo..." Poste regis silento pri tiu problemo.
La sta 1970 haveblis en la stampo-banko kaj bedaŭrinde la bankestro ne malkovris la fonton (sendinton) de tiuj falsaj stampoj.



Mi hodiaŭ tuŝas tiun problemon pro atentigi, ke oni ne tro facilanime elspezu monon por senvalorajôj. "Katastrofo" povus naskiĝi, se tiuj falsajôj aperas en filatela konkura ekspozaĵo. Ili kapablas plene ruinigi tutan ekspozaĵon ĉe la ĵurio.
Mi kredas, ke la stampiloj ankoraŭ hodiaŭ ie kuŝas por aktivigi, se la merkato por tiu ŝajnas oportuna.

El aliaj landoj ne konatiĝis al mi falsaj stampoj kun unu escepto: PL 2. Mia PL 2 estas tre dubinda. Kelkaj faktoj de la peco atestas la supozon de falseco. Ekz.: sama viola inko por la sta kaj la per adres-stampilo surstampita adreso. Krome eblas konstati plurajn variaĵojn en la tekstaranĝo inter originalo kaj imitaĵo. Por detaligi la esploron, estus bone, se vi sendus al mi kopiojn pri viaj PL 2, kun noto pri ĝia koloro.

Alia afero estas la "filatelaĵo" el la ekspo de Oroshaza 1957. Temas pri afrankita pk, stampita per stampilo, kiu havas la saman bildon kiel la glm de tiu E-ekspo. Sur la pk estas gluita poŝta ekspres-slipo. La tuta "filatelaĵo" apud tiu falsa sta havas unu eraron: sur la pk troviĝas tri vertikalaj strekoj por la kodnumero kaj pri tio siatempe neniu povis scii. Mi ne scias, ĉu iu vendis tiun produkton.

Komplika estas la situacio ĉe la ĉinaj stampoj, sed pri ili ja daŭre legeblas en nia informilo, antaŭ FENIKSO kaj nun LVL.

Mi ĝojus pri reago de vi kun kopioj!!

ESPERANTISTOJ SUR PM

Pentristo OTTO DIX.

La INFORMILO de E-Ligo Berlino enhavis en sia eldono de januaro 1992 la por germanaj E-istoj surprizan informon, ke Otto Dix estis Esperantisto! Esperanton li lernis antaŭ 1910 en Gera (ekzistis tie aktiva Laborista E-Klubo) kaj ekde 1910 Esperanto fariĝis komuna lingvo inter li kaj f-ino Helene Jacob el Dresden. Dix militservis dum la unua mondmilito kaj sendis ĉ. 360 mane desegnitajn pk-ojn al f-ino Jacob (krajone, krete, karbe kaj grafite). Ili akompanis liajn leterojn kaj ilustris la infernan vivon sur la batalkampoj de norda Francio. Restis el tiuj 46 ekzempleroj. Ili estis videblaj en Otto-Dix-Ekspozicio en Berlino, komence de 1992.



La artgalerio: "Kunstgalerie Gera", Küchengartenallee 4, D-O-6500 Gera, eldonis libron "Feldpostkarten der Otto-Dix-Sammlung" (temas pri militpoŝtaj kartoj) kun ĉiuj desegnaĵoj/poŝtkartoj kaj tekstoj. ISBN 3-910051-03-0. Havebla en la librovendejo de la galerio. Unu el la de Dix mane en Esperanto skribitaj pk'oj tekstas:

"...Kara Samideanino! Mi tre forte esperas, ke baldaŭ estas paco, sed mi ne ĝin kredas. Multajn salutojn via Dix".

1991 aperis en Germanio portreta pm pri li.

(La bildkarton de la Laborista E-Grupo Gera dum Aprilo 1914 vd.paĝo15)



Laborista Esperantista Grupo »ĈIAM ANTAŬEN« Gera (Reuss),
Aprilo 1914 a.

GLUMARKOJ

Internacia E-filatela ekspozicio, Straẑnice, 25.7. -2.8.1992

★ Internacia
E.filatel a ekspozicio
25.7. - 2.8. 1992
STRÁŽNICE

Nur teksto kaj verda stelo, verda sur blanka, memglua.

Eĉ nia Hasala ne sciigis pri ilin. Mi trovis ilin sur kovertoj kaj tion eĉ en tri(!!) variaĵoj:

E.filatela E.filatelia E.filatel a

25-a Internacia Renkontiĝo Naturamikoj IREN en Abaliget, 15.-24.7.1992

Manoj, montoj, floroj, stelo. Arĝenta, ve, ni, ru, memglua, tondita. Ricevita de Fekete.

Pardonpeto!

Pro malatentemo okazis, ke mi en LVL 89 misinformis pri la franca glm por la 47a kgr de SAT-AMIKARO. Jam en N-ro 88 mi prezentis la detalajn informojn, senditaj de nia Sadier. Pardonon mi petas.

5-a PACIFIKA KONGRESO DE ESPERANTO, Qingdao, Cinio.



Aŭgusto 1992. Ronda mg 40 mm Ø, ve kaj blanka sur helblua, E-stelo super ondoj.

Informis: Gao Shenxing, dankon !

Detaloj pri tiu kongreso vd. sub stampoj.

ATENTU: Pro mankoj de Informoj ni nur en la venonta LVL raportos pri aliaj glm kaj ankaŭ prezentos bildojn de ili.

C E T E R E ....

Cu ĉina leterportisto kun E-stelo sur la brusto? Ne!!

En nia lasta LVL ni demandis pri E-stelo sur ĉina tutaĵo. Feliĉe unu el niaj multaj ĉinaj geamikoj respondis, nia Song Shengtan. Li informis, ke la figuro de leterportisto aperas sur serio de pk, aperintaj okaze de la Jaro de Simio (12 diversaj bildoj). La insigno sur la brusto ne havas rilaton al Esperanto, sed estas la simbolo de la ĉina "Poŝto kaj Telegramo". Eĉ ne "E" aperas en ĝi, sed entute 3 ideogramoj. Nu, bone. Afero klara, problemo solvita.
Dankon pro la informoj kaj materialo.



La stel-simbolo de la ĉina poŝto.



Letero, sen dato, de nia majstro d-ro L.L. Zamenhof el la arkivo de nia redaktoro.

Dr° L. L. Zamenhof

Varsovio, str. Dzika № 9.

Estimata Sinjoro!

Batali publike kontraŭ la [illegible] estas, laŭ mia opinio, tute superflua afero, ĉar ili uzas diversajn sekretajn rimedojn, kiujn ni uzi ne povas, kaj nia polemiko kontraŭ ili nur faras al ili reklamon. Mi opinias, ke estos plej bone, se ni tute silentos pri ili kaj trankvile iros nian vojon.

Via L Zamenhof

Fine, Ĉar estas la lasta numero por 1992

NI DEZIRAS AL ĈIUJ

ELF-AREK´ANOJ

Ĝojan Kristnaskon

KAJ



AMIKOJ DE LA VINJETO ANTITUBERKULOZA



FILO DE LA
FILATELIA KLUBO
DE VENDRELL

Barcelona - Vendrell
(Hispanio)
Decembro (1961a)





Informilo de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh e.V.

Redaktoro: Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62
D-O-9051 Chemnitz
Prezidanto: Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29
S-17144 Solna
Kasisto: Rolf Beau, Jacobstr. 9,
D-O-7010 Leipzig
Poŝtgirokonto:
Poŝtĝiro-Oficejo; Nürnberg, bankkodo(BLZ):760 100 85)5)
Konto-No: 3667 37-855 (adreso de Beau)
Kotizo por 1993: DM 21,-- /13 IRK/13 US$

UEA-konto de ELF-AREK: UEA-kodo: elfx-r

Stampobanko: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4
D-W-3040 Soltau
Kompostis+ ekspedis: Richard Hirsch, Lambertstr. 12,
D-W-6430 Bad Hersfeld
Presejo: Albert Oesterle, Hubertusstr. 28,
D-W-8853 Wemding